

Joseph Döpjohann,  
La birdokanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mi aŭdis birdokanton,  
belege sonis ĝi;  
mi volis ĝin kompreni,  
ravita estis mi.

Ĝi kantis frumatene -  
trankvilo ĉie ĉi;  
forĝesis mi la zorgojn,  
rekonsoliĝis mi.

Momenton mi ekpensis  
ne plu pri l' taglabor';  
mi volis pluaŭskulti,  
sed devis iri for.

Vesper' fariĝis baldaŭ,  
rapidis hejmen mi,  
por aŭdi mian birdon;  
sed ne revenis ĝi.

*Traduko de la Basgermana poemo "De Vugelleed" de JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, \*1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2003-03-19.*

*MR-401-1 / Arg-249-505 (2004-06-30 15:20:30)*

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Döpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*